

Christian Morgenstern,  
**La lupfantomo**  
*tradukita de Bertilo Wennergren*

Jen lupfantom' de famili'  
 meznokte iam kuris for  
 al tombo de la profesor'.  
 kaj petis pri konjugaci'.

Do diktis tiu dokta ul'  
 starante sur la kructabul'  
 dum lup' senmova kiel splinto  
 atentis vortojn de l' mortinto.

De "lupfantomo", simpla rekta,  
 tra "lupfintomo", plej perfekta,  
 plu "lupfontomo", iom rara,  
 ĝis "lupfutomo", ho, ko\$mara.

Ĉi participoj plaĉis multe  
 al la fantomo, kaj rezulte  
 ĝi petis: "Legu plu el PIV-o  
 pri participoj en pasivo."

La viro ĉagreniĝis tamen:  
 "Jam fermis mi per fin' kaj amen,  
 ĉar netransiraj bestoj feblas  
 kaj la pasiv' neniam eblas."

Sed lupfantomo pri transiro  
 ja spertas pli ol eĉ vampiro.  
 La lup' revenis larmokula  
 al sia famili' ulula.

...

Christian Morgenstern,  
**The Banshee (An Approach)**  
*tradukita de Max Knight*

One night, a banshee slunk away  
 from mate and child, and in the gloom  
 went to a village teacher's tomb,  
 requesting him: "Inflect me, pray."

The village teacher climbed up straight  
 upon his grave stone with its plate  
 and to the apparition said  
 who meekly knelt before the dead:

"The banSHEE, in the subject's place;  
 the banHERS, the possessive case.  
 The banHER, next, is what they call  
 objective case—and that is all."

The banshee marveled at the cases  
 and writhed with pleasure, making faces,  
 but said: "You did not add, so far,  
 the plural to the singular!"

The teacher, though, admitted then  
 that this was not within his ken.  
 "While bans are frequent", he advised,  
 "A she cannot be plurized."

The banshee, rising clammily,  
 wailed: "What about my family?"  
 Then, being not a learned creature,  
 said humbly "Thanks" and left the teacher.

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Werwolf” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de Bertilo Wennergren.*

Arg-825-1653 (2013-02-14 23:29:47)

Vidu la retejon <http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Der Werwolf” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en la Anglan de MAX KNIGHT (civila nomo: Max Kühnel, \*1909-06-08 – †1993-08-31).*

Arg-825-1660 (2013-02-13 22:36:06)

Tiu ĉi anglico troviĝas en <http://bertilow.com/literaturo/lupfantomo.html>. Pri la tradukinto Max Knight vidu: [http://www.jbeilharz.de/morgenstern/morgenstern\\_poems.html](http://www.jbeilharz.de/morgenstern/morgenstern_poems.html)  
 kaj [http://www.123people.de/ext/frm?ti=ersonensuche%20telefonbuch&search\\_term=max%20k%C3%BChnel&search\\_country=DE&st=suche%20nach%20personen&target\\_url=aHR0cDovLd3dy5saXRlcmF0dXJ0YXVzLmF0L2luZGV4LnBocD9pZD020Dc4](http://www.123people.de/ext/frm?ti=ersonensuche%20telefonbuch&search_term=max%20k%C3%BChnel&search_country=DE&st=suche%20nach%20personen&target_url=aHR0cDovLd3dy5saXRlcmF0dXJ0YXVzLmF0L2luZGV4LnBocD9pZD020Dc4).